
# *Díaz-Canel: registara sistemo bazita sur scienco kaj novigado*



**Díaz-Canel pledas por scienco kaj novigado**

Havano, mar 22 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel asertis ke nepras en nia lando disponi je sistemo de registara mastrumado bazita sur scienco kaj novigado.

En artikolo publikigita en la revuo Anales de la Scienca Akademio de Kubo, la insula ?tatestro asertas ke tia sistemo estas unu el la pilieroj por bona mastrumo.

Li mencias spertojn de la lasta jardeko, kiel la avancoj en la rilatoj inter scienco, novigado, formado de homaj rimedoj kaj loka evoluigo; anka? la dialogoj scienco-registaro por pritrakti kompleksajn problemojn ege gravajn kiel la Kovim-19; kaj ties posta ampleksi?o al nutra suvereno kaj nutra klerigado.

La ?tatestro emfazis ke funkciigi tian sistemon estas “a?tenta defio, kiun ni devas alfronti en nacia kaj internacia kunteksto kompleksa”, kaj donas gravan rolon al la registara mastrumo en ?iuj niveloj.

Díaz-Canel anka? identigas la problemojn limigantajn la sekvojn de kono, scienco kaj novigado en la plenumo de la Nacia Plano de Ekonomia kaj Socia Evoluo ?is 2030 kaj pretere.

Li asertis ke kiam oni pritraktas tiujn temojn ne eblas forgesi la internacian kuntekston, kaj asertas ke la monda distribuo de la kapacitoj konaj, sciencaj kaj teknologiaj estas malsimetriaj kaj estas ege koncentrita en malgranda grupo de landoj. “Signifa parto de tiuj kapacitoj estas propra?o de la grandaj transnacioj kaj ties ?efaj investistoj estas  la milita komplekso industria”.

Li memorigis la rolon de la ?efkomandanto Fidel Castro, sendube la granda respondeculo de la avanco de la nacia scienco revolucia. Fidel anta?planis estontecon de la insulo ekde 1960 kiel  “futuro de homoj de scienco, homoj de penso”

“La batalo por evoluigo, sendependeco kaj suvereneco, kiel ?iam insistis Fidel, postulas la kreadon kaj mobilizon de la kapacitoj de scienco, teknologio kaj novigado. Tiu ?i devus esti dividita konvinko de ?iuj: popolo, registaro, entreprenistoj, sciencistoj, profesoroj, instruistoj, kamparanoj”.

fonto: Granma

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/251447-diaz-canel-registara-sistemo-bazita-sur-scienco-kaj-novigado](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/251447-diaz-canel-registara-sistemo-bazita-sur-scienco-kaj-novigado)

**Radio Habana Cuba**